

Paulo Sergio Viana

Ĉu vi scias la devenon...?

Legolibro por progresantoj



Sanpaŭlo, 2026

Ĉu vi scias la devenon...?

Verkis: Paulo Sergio Viana

Enpaĝigis: José Roberto Tenório

Eldonis: Esperanto-Asocio de San-Paŭlo –

Sanpaŭlo, 2026 (2-a eld.)

Presis: fabricadolivro.com.br

Ilustraĵoj faritaj per programo de artefarita inteligenteco

Ĉi tiu verko estas uzebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo
Tutmonda, kun atribuo kaj sen modifo (CC BY-ND 4.0),
disponebla ĉe:

<https://creativecommons.org/licenses/by-nd/4.0/deed eo>

© Paulo Sergio Viana (aŭtoro), 2026

V614ĉ

Viana, Paulo Sergio.

Ĉu vi scias la devenon...? : Legolibro por progresantoj / Paulo Sergio Viana. – 2^a. eld. – Sanpaŭlo: Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, 2026.

40 p. – 14 x 21 cm.

ISBN 978-85-67422-32-9

1. MITOLOGIO. 2. METAFOROJ. I. Titolo.

CDD 398.22

Kataloga slipo ellaborita de Neide Ap. de Freitas — CRB-8/9091.

Enhavo

Prezento	05
Donaco de greko	07
Ĥimero	09
La fadeno de Ariadno	11
La glavo de Damaklo	13
La ĵetkubo estas ĵetita	15
La kalkano de Aĥilo	17
La kanto de cigno	19
La kanto de sireno	21
La ovo de Kolumbo	23
La pomo de malkonsento	25
La reĝo mortis. Vivu la reĝo!	27
La teksaĵo de Penelopo	29
Mian regnon por ĉevalo!	31
Miel-luno	33
Minerva voĉdono	35
Propeka kapro	37
Venko de Pirho	39

Prezento

Mi pensas, ke homoj, kiuj ĵus lernis novan lingvon, bezonas taŭgajn tekstojn en tiu lingvo, por evoluigi la lernadon. Rilate al Esperanto, ekzistas jam amaso da verkoj por tiu celo, feliĉe. Ĉi tiu libreto estas nur unu plia.

Tekstoj por progresantoj estas aparta speco de literaturo. Ili devas iamaniere faciligi la vivon de tiuj legantoj. Sed persone mi pensas, ke ne temas nur pri uzado de la plej oftaj vortoj. Novaj, nekonataj vortoj ne estas granda baro: bona vortaro solvas tiun problemon facile.

En ĉi tiu libreto nia zorgo ne estis la ofteco de vortoj en Esperanto. Niaj kriterioj estis aliaj:

- eviti tro longajn tekstojn;
- eviti tro longajn, komplikajn frazojn;
- eviti tro komplikajn formojn de la akuzativo;
- eviti tro komplikajn formojn de participoj;
- eviti tro komplikajn kunmetaĵojn de vortoj;
- eviti neordinarajn vortordojn en la frazoj.

Unuvorte, ni klopodis imiti, laŭeble, la stilon de klasikuloj.

Samtempe, oni devas proponi ne infanecajn, banalajn temojn, kiuj certe ne stimulus multajn legantojn. La temoj devas esti sufiĉe interesaj, se eble klerigaj por homoj kun ĝenerala intereso. Ni do elektis kolekton da internacie uzataj metaforaj esprimoj, kies devenon la plej multaj el ni ne konas.

Mi esperas, per ĉi tiu modesta kolekto, kontribui al la legemo de niaj samideanoj.


PSV

Donaco de greko

Foje okazas, ke homo ricevas donacon, kiu alportas problemojn, anstataŭ plezuro. Ekzemple, se Petro donacas sian malnovan, kadukan aŭtomobilon al Johano: la aŭtomobilo estas en tiel malbona stato, ke ĝi ofte paneas. Johano devas pagi por riparoj kaj suferi ĉagrenojn. En tiaj okazoj, certe Johano ekkrios:

— Jen tio estas donaco de greko!

Ĉu vi scias la devenon de tiu esprimo?



Ĝi rilatas al la fama ‘Troja Milito’, kiu okazis kelkajn jarmilojn antaŭ Kristo, laŭ legendo transskribita de pluraj aŭtoroj, interalie Homero, per ‘Iliado’. La militon kaŭzis la kapto de la bela Helena, fare de Troja princo. Multaj grekaj herooj sieĝis la urbon kun miloj da soldatoj, sed jaroj pasis kaj ili ne sukcesis venki la trojanojn. Multaj mortis kaj iom post iom la humoro de la soldatoj fariĝis malentuziasma. La milito daŭris jam dek jarojn!

Tiam la ruza heroo Odiseo (latine: Uliso) pensis pri trompo. Li proponis, ke oni konstruu grandan lignan ĉevalon. Oni donacos la ĉevalon al la trojanoj kiel signon, ke grekoj rezignis pri la milito. Kaj oni ŝajnigos, ke grekoj forveturis.

Tiel ili agis, kaj la trojanoj kun festo (kaj drinkado) akceptis la donacon. Tamen, la ĉevalo havis internan spacon, kaj tie sin kaŝis la plej fortaj grekaj batalantoj. Nokte, kiam la trojanoj dormis, la grekoj venis el la ĉevalo kaj malfermis la urbopordojn. La grekaj soldatoj, kiuj sin kaŝis proksime, envenis en Trojon, mortigis la malamikojn kaj detruis la urbon. Tiel finiĝis la longa milito – per neforgesebla donaco.

Ĥimero


La mondo baraktas en la konfuzo de lingvoj de pluraj jarmiloj. Multaj saĝuloj klopodis solvi tiun problemon, vane. Kiam Zamenhof fine trovis la solvon kaj proponis Esperanton, multaj homoj diris:

— Esperanto estas ĥimero!

Ĉu vi scias la devenon de tiu nomo?

Ĥimero estas mitologia figuro, kiu aperis en la antikva Helenujo, pli-malpli en la sepa jarcento antaŭ Kristo. Oni

represas ĝin kiel monstren, kies korpo estas miksaĵo de kapro kaj leono (laŭ iuj versioj, la vosto estis serpento, kaj ĝi havis flugilojn). Ĝi eligis fajron tra la nazego kaj la homoj



tre timis ĝin. Laŭ antikvaj mitoj, ĝi naskiĝis de la unuiĝo inter alia monstro – duone virino, duone serpento – kaj la giganta Tifono (dio de la ventegoj).

La ĥimero atakis kaj detruis multajn lokojn, ĝis la heroo Belerofono sukcesis mortigi ĝin, kun la helpo de sia ĉevalo Pegazo. Ĉi tiu estis flugilhava ĉevalo, simbolo de poezia inspiro. En nia moderna tempo, la figuro de la katolika Sankta Georgo, kiu mortigas drakon, estas heredaĵo el la antikva legendo pri Belerofono.

Nuntempe, la vorto ‘ĥimero’ havas la signifon de ‘io neebla’, ‘fantaziaĵo’, ‘utopiaĵo’, ‘absurdaĵo’. Sekve, homoj, kiuj opinias, ke Esperanto estas ia ‘ĥimero’, ne estas bone informitaj pri nia lingvo. Aŭ ili ne scias, kion signifas la vorto ‘ĥimero’.